



8-6-1974

CGC Nº
00406 504/0001-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA

Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA

Alameda dos Maruas, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP

NOV/DEZ/1982

BOLETIM INFORMATIVO

Nº 74

LA LASTA KONGRESO DE BKE KAJ ĜIAJ GRAVAJ ATINGOJ



Deputito Freitas Nobre dankas omaĝon ricevit
tan de BKE pro enkonduko de E-libroj en la
bibliotekon de la Ĉambro de Deputitoj.

Malgraŭ diversaj pesimismaj avertoj kontraŭ realigo de nia evento sen sufiĉa tempo por ĝia antaŭpreparo, la tria jarkongreso de BKE estis unu el la plej gravaj E-manifestacioj okazintaj en nia lando, post la efektivigo de la 66a UK en julio 1981. Planita kaj preparita dum apenaŭ 90 tagoj, ĝuste pro tio la loka organiza komitato bezonis labori duoble por sukcesigi la kongreson, kiu plaĉis al la plimulto kaj trafis sian ĉefan celon: elmontri al publiko neesperantista, prefere en registara medio, la praktikajn eblecojn de la Internacia Lingvo.

Efektive, en la kadro de sia kongreso, realigita en Brazilja de la tria ĝis la kvina de decembro, BKE okazigis du eksterajn manifestaciojn, kiujn multaj konsideris tre signifaj por la fortikigo kaj agnosko de nia movado. La epizodoj konsistis el oficiala vizito de kongresanoj al la Superega Justica Federacia Tribunalo - unika okazintaĵo en la historio de Esperanto en nia lando - kaj starigo de granda ekspozicio de esperantaj libroj en la Ĉambro de Deputitoj, en kies biblioteko estas nun permesate enkonduki tiajn verkojn, egalrajte kun miloj da libroj tie katalogigitaj en pluraj nacilingvoj. Menciindas ĉi-tie, ke la gravan konkeron oni ŝuldas al deputito, d-ro

Freitas Nobre, aŭtoro de la leĝoprojekto kiu malfermis al Esperanto la pordojn de tiu fama biblioteko. Krome, por trafi publikon neinformitan pri la Lingvo, estis programitaj, en plej taŭga dimanĉa horaro, du religiajn diservojn - katolikajn, en la multkonata Preĝejo "Dom Bosco", kaj evangelian, en tiu nomata "Memorial Batista". En ambaŭ temploj, la plimulto de la ĉeestantoj, verŝajne la unuan fojon en la vivo, aŭdis de la respektindaj predikantoj, en nacia lingvo, oportunajn klarigojn pri Esperanto kaj tre favorajn vortojn pri ĝia facileco, utilo kaj graveco por la tuta homaro. Bedaŭrinde, neniu sonbendigis la altvaloran reklamon...

Ankaŭ por altiri la atenton de neesperantistoj, la kongreso prezentis portugallingve, en la komforta teatro de la konstruaĵo "Memorial JK", tre interesan filmon pri la eksterordinara simileco de la urboplano kaj arkitekturo de Brazilja kun pluraj realaĵoj de la antikva Egiptujo. Tuj post la filmo, la publiko surprizigis kaj spertis neatenditan emocion antaŭ la esperantlingva teatra prezentado de La Festeno de la Kardinaloj, kiun la teatro-trupo de KKE, formita de Reginaldo L. Cipolatti, d-ro Braz Cosenza kaj d-ro Álvaro Fausto de Souza, enscenigis unuafoje en Brazilja. Laŭ nia kompreno, la Internacia Lingvo bezonas transpaŝi urĝe la limojn de la tradiciaj E-rondoj, por ke ĝi rekte kaj firme influu klarajn homojn en la plej altaj ŝtupoj de la socio kaj faciligu al ni tie varbi patronojn aŭ agemajn simpatiantojn por la nacia movado. Sub tiaj konsideroj, kelkaj spertuloj konfidencis al ni, ke BKE-kongreso rolis pli efike en tiu strategio ol la pasinta 66a UK mem!

La leganto trovos en ĉi Bulteno aliajn notojn pri la kongreso, kiu finiĝis per agrabla kunfratiĝa tagmanĝo en la paradiza "Iate Clube de Brasília", antaŭ la rigardoj de centoj da homoj apartenantaj al la anaro de la gastiganta klubo. Kompreneble, por la kongresanoj, helpantoj kaj aŭtoritatuloj ne mankis la tradicia adiaŭa saluto kaj koncernaj dankesprimoj de la prezidanto de BKE, kiu persone respondas pri la enhavo de tiu ĉi artikolo.

Casc

BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Honora Prezidanto

Francisco de Souza Almada, Rua Galeão
Carvalho, 31, Ap. 73, BR 11100 - Santos - SP

Estraro

Prezidanto: Carlos A. S. da Cunha, Alameda
dos Maruás 471, Planalto Paulista, BR 04.068,
São Paulo - SP

Vicprezidanto: Nelson P. de Souza Caixa
Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

Kasisto: José Carlos Dorini Ramos - SHIN
QI 02 - Cj. 08, casa 15 BR 71500 - Brasília - DF

Sekretario: F-ino Lêda da Silva Gama, SQS
306-A 101, BR 70353 - Brasília - DF

Kulturaj Aferoj: Walter A. Francini, Rua
Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo,
BR 04613, São Paulo - SP

Informa Bulteno

Oficiala organo planita por monata apero.
Dissendo senpaga

RESPONDECAJ DIREKTOROJ: Carlos A.
S. Cunha, Nelson P. de Souza kaj Walter
Francini
Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La
estraro, tamen, ne respondecas pri subskri-
bitaj artikoloj.

KIO MANKAS AL LA BRAZILA MOVADO?

Rigardante la nuntempan brazilan Esperanto-movadon, oni konstatas gravan progreson rilate ĝian situacion antaŭ nemultaj jaroj. Jen kelkaj aspektoj montrantaj tiun plibonigon: la 66-a Universala Kongreso brile kaj kun alta mona profito, okazinta en Brazilio 1981; la prestiĝo, kiun la brazila Esperanto-movado ĝuas nun ĉe UEA (en 1981 Brazilio estis la lando kun la plej granda nombro de aliĝoj al la Universala Asocio); la pliofteco de la naciaj aŭ regionaj renkontiĝoj (en la jaro 1982 okazis la Seminario de Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Uberlândia, la Kongreso de BKE en Brazilio, la Sudbrazila Renkontiĝo de Esperanto en Curitiba, la regionaj renkontiĝoj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, en São José dos Campos kaj Taubaté, la Kongreso de BEJO en Natal; la bona nivelo de la lingvo uzata en la oficialaj programejoj de la renkontiĝoj (la veteranoj atestas ke ĉe la malnovaj brazilaj kongresoj oni parolis nur... nacilingve!); la regula publikigo de tiu ĉi Bulteno; la apero de kelkaj bonaj instrumentodoj verkitaj de brazilaj instruistoj; la fondo de la agema Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, kiu eldo-

nas kaj disvastigas tra la mondo religiajn verkojn; la konstanta aktivado de Esperanto-fako de Brazilia Spiritisma Federacio; la fondo de Brazilia Konsilantaro de Esperanto, daŭre plenumanta bonegan nacian laboron; la daŭra kaj efika regiona agado de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo; la akurata publikigo de la literatura revuo "Fonto"; la disvastigado de Esperanto pere de konstantaj rubrikoj ĉe gravaj naciaj gazetoj en la urbo San-Paŭlo; la apero de laborema nacia junulara movado, k. t. p.

Malgraŭ ĉio ĉi, kelkaj aferoj ankoraŭ ne kontentige iradas en la brazila movado. Unualoke la kunlaboro inter la kupolaj organizaĵoj restas ankoraŭ nur teoriaj, surpaperaj. Vere la efektivigo de la UK en Brazilio permesis ioman progreson sur tiu kampo, sed minimuman. Nun ni esperu ke la Centjaro de Esperanto Kontribuu por la malapero de tiu manko kaj permesu ke la Zamenhofa spirito plene regu ĉe la brazila esperantistaro. Ankaŭ la rilatoj inter la brazilaj Esperanto-organizaĵoj kaj Brazilia Spiritisma Federacio (FEB) ne estis kontentigaj ĝis antaŭ nelonge, eble pro neĝusta ideo pri neutraleco. FEB estas ja, almenaŭ laŭkvante, la ĉefa eldonejo de esperantaj libroj en la mondo; ĝiaj eldonaĵoj konsistas el du branĉoj; lingvinstruaj kaj religiaj verkoj. Kompreneble la duaj estas nenŭtralaj por la Esperanto-movado, sed la unuaj (vortaroj, "Esperanto sem Mestre" kaj aliaj) ege taŭgis kaj taŭgas por ĉiuj esperantistoj, ne nur por la spiritistoj. Malgraŭ tio, estis kvazaŭ abismo inter la oficiala brazila Esperanto-movado kaj FEB. Feliĉe tio eksangiĝas ekde la 66-a UK, kiam okazis faka kunveno de spiritistoj en la kadro de la kongreso. Kaj en la ĵusa Kongreso de BKE same efektiviĝis aparta kunveno por spiritistoj-esperantistoj kaj okazis aparta kunsido ĉe la centra sidejo de FEB en Brazilio, sub la gvidado de la reprezentanto de FEB, s-ro Afonso Soares. Evidente tio ne rompas la neŭtralecon de la Esperanto-movado, male ĝi reliefigas ke sinteno laŭ la spirito de la Deklaracio de Homaj Rajtoj utilas por ĉiuj. En la lasta Kongreso de BKE efektiviĝis ankaŭ diservo ĉe Baptista templo kaj meso ĉe Katolika preĝejo.

Alia tikla punkto mencienda estas la financa flanko de la brazila movado. Oni komprenu ke idealismo ĉefrolas en kiu ajn movado, sed ke ĝi sola ne sufiĉas. Feliĉe ankaŭ tiufланke BKE indikas la vojon sekvdan: adopto de entreprenista pensmaniero. Nehazarde la ĉefaj gvidantoj de BKE estis aŭ estas funkciuloj de Banko de Brazilo aŭ de Centra Banko.

Sed plej tikla punkto de la nuntempa brazila Esperanto-movado estas manko de programo por la fatala anstataŭigo de la nunaj givdantoj. Kiuj venos kiam la nunaj estroj retiriĝos pro laco aŭ forpaso?

Tiurilate mi pensas ke la plej bona solvo kuŝas sur la edukado. Bone instrui Esperanton ne sufiĉas. Instruisto de la internacia lingvo instruu, krom legi, kompreni, paroli kaj paroli,

ankaŭ ami Esperanton kaj ĝian movadon. Instruisto evidente estu lerta pri la arto instrui, sed precipe li/ŝi estu ankaŭ edukisto. Tiurilate Esperanto prezentas ampleksan kampon, intime ligitan al la homaj rajtoj, kiuj estu idealo kaj celo por ĉiuj homoj, sendepende de religio, raso aŭ nacio. "Esperanto kaj Homaj Rajtoj" estu flago por pli bona mondo, konkerota per paca revolucio. Kaj ja edukisto ne forgesu ke por entuziasmigi la lernantojn, unue li aŭ ŝi entuziasmiĝu. Resume: la Esperanto-instruoprogramoj celu ankaŭ konvene prepari la estontajn instruistojn kaj movadajn gvidantojn.

La brazila movado "floras" nuntempe, laŭ la taŭga esprimo aperinta en poeziaĵo de nia samideano Nelson Pereira de Souza. Ĉu la tri mankoj menciitaj (komuna agado inter la kupolaj organizaĵoj, financa agado laŭ entreprenista pensmaniero kaj konvena preparado de estontaj gvidantoj) malaperos antaŭ la Jarcento de Esperanto?

Ni laboru por tio.

Walter Francini



De maldekstre, s-ro Carlos A. Cunha, d-ro Braz Cosenza, kaj kolonelo Galvão Marinho, konsistigantoj de la Nacia Esperanto-Komisiono.

NACIA ESPERANTO-KOMISIONO

Flanke de la laborkunsidoj specifaj de la 3a jarkongreso de BKE, estis aprobita de la prezidantoj de la tri naciaj E-organizaĵoj la regularon pri la funkciado de la Nacia Komisiono kreita en Uberlândia, por orienti la kvinjaran agadplanon cele al la festoj por la Jubileo de Esperanto, kaj ankaŭ por zorgi pri la ĝeneralaj problemoj kaj intereso, inkluzive financaj, de la E-movado en nia lando.

La regularo, proponita de BKE, pendas nur de fina redakto sub respondecado de kolonelo Galvão Marinho (BEL) kaj de d-ro Braz Cosenza (KKE). Tiu grava dokumento estos sendata al ĉiu esperanta asocio en nia lando, kaj ankaŭ al tiuj kiuj simpatias kaj favoras al Esperanto.

BONDEZIROJ KAJ GRATULOJ RICEVITAJ

Ni elkore dankas kaj reciprokas bondezirojn ricevitajn de la subaj institucioj kaj homoj, okaze de la Kristnasko kaj jarŝanĝo aŭ pro okazigo de la 3a BKE-Kongreso: Cooperativa Cultural dos Esperantistas, Rio (RJ); Brazila Esperantista Junulara Organizo, Brasília-DF; San-Paŭlo Esperanto-Asocio, S.Paulo-SP; Associação Pernambucana de Esperanto, Recife-PE; Sociedade Bauruense de Esperanto, Bauru-SP; Promissão Esperanto-Asocio, Promissão-SP; Esperanto Klubo de Montes Claros, Montes Claros-MG; Grupo Crisol, São Miguel Paulista-SP; Esperanta Studgrupo "Zamenhof", Salvador-BA; Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga, Rio-RJ; Esperanto Societo de Porto Alegre, Porto Alegre-RS; Sociedade Bauruense de Esperanto, Bauru-SP; Ilhéus Esperanta Grupo, Ilhéus-BA; Esperanto-Societo de Rio Grande, Rio Grande-RS; Heroldo de Esperanto, Espanha; Abraje Associação Brasileira de Jornalistas e Escritores Espíritas, Rio-RJ; Lar Anália Franco, São Manuel-SP; Instituto Espírita da Bahia, Salvador-BA; Mitra Arquidiocesana de Brasília, Brasília-DF; Círculo Esotérico da Comunhão do Pensamento, S.Paulo-SP; Gráfica Brasileira, Brasília-DF; Amaro Pinagê Soares, Recife-PE; Celina Souza Figueira, Rio-RJ; Maximiliano de Oliveira e Silva, Porto Alegre-RS; Eluizio Bueno Rodrigues, Sorocaba-SP; Jornal Alavanca, Campinas-SP; Prof. Francisco S. Almada, Santos-SP; Jorge Purgly, S. Bernardo do Campo-SP; Prof. José Passini, Juiz de Fora-MG; José Saraiva Matos, Salvador-BA; Cleusa Maria Leon Cezar, Barra Mansa-RJ; Herasmo Leite, Brasília-DF; Stefan Mc Gill, Holanda; Nelson Ribeiro, Santos-SP; José Martins Coelho, S. Miguel Paulista-SP; Ivon Barbosa, Bauru-SP; Walter Francini, São Paulo-SP kaj Manoel Borges dos Santos, Salvador-BA.

BKE-JARKOTIZO 1983

Multaj anoj ankoraŭ ne renovigis siajn jarkotizojn por 1983. Al ili, kaj al ĉiuj kiuj deziras aliĝi al nia Asocio, bonvolu sendi tuj la koncernan sumon de Cr\$ 2.000,00, rekte kaj favore al Conselho Brasileiro de Esperanto, em Brazilja. Novaj membroj, samtempe kun la pago, devas informi tutan nomon, naskiĝdaton, sekson, civilan staton kaj kompletan adreson.



TRA LA MONDO

KONGRESA TEMO 1983

● La estraro de UEA decidis, ke la kongresa temo en Budapeŝto (68a UK) estos "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna Komunikado".

BABELTURO EN UNUIGINTAJ NACIOJ

● Laŭ lingva parto de la Proceda regularo de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝinta Naciaro (Regulo 51), la araba, angla, franca, rusa kaj hispana estas la oficialaj kaj laboraj lingvoj de la Ĝenerala Asembleo kaj ĝiaj komitatoj kaj subkomitatoj. Ho! Sankta Dio, kiam Esperanto?

APROBOTAJ KONTOJ DE UEA

● Kiel komitatano por Brazilo, nomumita de BEL kaj KKE, s-ano Carlos A.S. da Cunha, surbaze de la kompletigaj raportoj de la revizoroj, s-roj L. Hordijk kaj S. Steinberg, akceptis per skriba voĉdonilo la kontojn de UEA por 1981.

NORMIGO DE GEOGRAFIAJ NOMOJ

● En aŭgusto pasintjare okazis en Ĝenevo la kvara konferenco pri normigo de geografiaj nomoj (tiajn konferencojn organizas Unuiĝintaj Nacioj ĉiun kavararan jaron). Ĉeestis specialistoj de 59 landoj; oni laboris dum semajnoj en kvin kunsidoj (kaj uzis ses lingvojn) sed la progreso estis minimuma. Finnoj, ekzemple, insistas nomi Nederlandon "Alankomaat", same kiel la resto de la mondo malatentas la nomon "Suomi" por la lando de la finnoj mem (Revuo Esperanto, n-ro 923).

ESPERANTO POR LA SCIENCIO

● La scienc-populara revuo "Ĥimija i ĵiznj" (Kemio kaj vivo) aperanta en Moskvo en 365 mil ekzempleroj, aperigis artikolon pri la lingva problemo en la scienco kaj 15-lecionan kurson de Esperanto, verkita de Boris Kolker. La partoprenintoj de tiu kurso deziras korespondi kun fakuloj en la tuta mondo. Jen do bona okazo por brazilaj sciencistoj kaj teknikistoj kontakti sovetaĵajn kolegojn pere de Esperanto. Interesi-toj skribu al: "Anatolo Gončarov Molodjojnaja 38-10, SU-14300, Odincovo Moskovskoj obl. USSR".

KELKAJ ASPEKTOJ DE BKE-KONGRESO



Dum oficiala vizito de kongresanoj al la Supera Justica Federacia Tribunalo.



Tri kongresanoj, kaj elstaraj homoj en la movado: Onésimo da Costa e Farias, d-ro Chersoneso Galvão kaj Prof. Ivon Barbosa, kiu ankaŭ prelegis dum la kongreso.



Portanta okulvitrajn, vidiĝas Prof. Geraldo Matos, inter la prezidanto Carlos Cunha, Nelson P. de Souza kaj la kasisto de BKE, s-ro José Carlos Dorini Ramos, dum paŭza momento de la antaŭkongresaj preparlaboroj.



EL LA NACIA GAZETARO

- O ESPÍRITA FLUMINENSE (C. Postal 287 - 24000 Niterói-RJ) publikigas rubrikon "Esperanto em Gotas" kaj en la n-ro 208 anoncis pri nia III Kongreso.
- JORNAL RIO GRANDE, en la samnoma urbo, aperigas rubrikon "Esperanto Lingvo Internacia", kies redaktanto estas s-ano D-ro Manoel T. Abreu.
- DIÁRIO DE MONTES CLAROS publikigis artikolon "Esperanto em Foco" verkitan de s-ano Antonio Felix da Silva.
- O SERRANO - dimanĉa gazeto de Serra Negra-SP - publikigas rubrikon de s-ano Silva Velho kun la titolo "O Esperanto em Pauta".
- FOLHA DO SUBÚRBIO (C. Postal 2 - 4280 Camaçari-BA) faris grandan propagandon pri la III^a Kongreso, dank' al laboro de s-ano Eleus L. Sá.
- FOLHA ESPÍRITA (R. Alvares Machado, 22/49 - 01501 São Paulo-SP) en sia monata eldono, krom la rubriko de s-ano Prof. W. Francini, anoncis ankaŭ la 3an kongreson de la konsilantaro.
- ALAVANCA (C. Postal 1384 - 13100 - Campinas-SP) aperigis grandan noton pri la III^a Kongreso.
- CORREIO FRATERO DO ABC (C. Postal 58 - 09700 S. Bernardo do Campo-SP) ankaŭ anoncis pri la 3^a Kongreso.
- SEI - SERVIÇO ESPÍRITA DE INFORMAÇÕES (R. Invalidos, 34 s/902 - 20231 R. Janeiro-RJ) - ĉiusemajna bulteno seninterrompe informadas pri nia Movado al la spiritistaro. Kiel sciante, ankaŭ aperas dumonata numero en Esperanto.
- PRESENÇA ESPÍRITA (R. Barão Cotegipe, 124 - 40000 Salvador-BA) aperigis mesaĝon "Petego" en Esperanto kaj anoncis pri la baldaŭa apero de la esperantisgita verko "La Semisto".
- RIE - REVISTA INTERNACIONAL DE ESPÍRITISMO (C. Postal 9 - 15990 Matão-SP) - publikigis grandan nonton pri la 3^a kongreso.
- CORREIO FRATERO (oficiala organo de União Regional Espírita Ramal Santa Cruz (R. Silva Cardoso, 673 - 21810 R. Janeiro-RJ) aperigis belan artikolon "Zamenhofe o Esperanto".
- CARIDADE - bulteno de Congregação Espírita Francisco de Paula (Rua Conselheiro Zinha, 31 - 20550 R. Janeiro-RJ) anoncis pri la 3^a Kongreso.

- O CLARIM (R. Rui Barbosa, 1070 - 15990 Matão-SP) ankaŭ aperigis elstaran anoncon pri la 3^a Kongreso.
- A NOVA ERA - de Fundação Espírita "Allan Kardec" (R. José Marques Garcia, 675 - 14400 Franca-SP) daŭre aperigas rubrikon "Esperanto em Foco" de s-ano Silva Velho.
- BOLETIM INFORMATIVO - de Grupo Espírita "Francisco de Assis" (R. Djalma Dutra, 28 - 24030 Niterói-RJ) publikigas rubrikon "Esperanto", de s-ano D-ro Joaquim do Couto.
- O ESPÍRITA - de Instituto Espírita Obreiros do Bem (R. André Rovai, 171 - 06000 Osasco-SP) prezentis belan artikolon "Notas Sobre o Esperanto".
- A LUZ DE DAMASCO - de Sociedade Espírita Allan Kardec (C. Postal 1682 - 90000 Porto Alegre-RS) publikigis interesan artikolon "O Aniversário de Zamenhof".
- JORNAL DA GENTE, suplemento de O FLUMINENSE (R. Visc. de Itaboraí, 184-Rio), en sia numero de 26-12-82 longe raportis pri Esperanto en Niterói, Brazilo kaj en la mondo, baziĝinte sur informoj liveritaj de d-ro Joaquim do Couto kaj Balbina Ferreira, respektive prezidanto kaj sekretario de Niterói E-Klubo. La publikigaĵo ankaŭ aperigas belan foton pri ambaŭ kaj alia direktoro de tiu asocio.

FMI kaj BKE

Nia kara lando, pro grandaj investoj en publikaj sektoroj kaj malfavora rezulto en la internacia merkato, estis devigata pruntpreni Dolarojn kaj aliajn devizojn, en la mondfama organizo FMI kaj en diversaj bankoj eksterlandaj.

BKE ankaŭ faris multajn investojn en 1982, precipe por organizi sian lastan kongreson. Tamen, por likvidi siajn debetojn ĉe diversaj kreditoroj, la estraro de BKE rezignis submetigi al la kondiĉoj kaj de FMI kaj de pluraj internaciaj bankieroj.

Kiel do solvigis la problemojn?

Tre simple. Ni elektis la propran nacian financon sistemon por forigi la minacantan krizon, tiel ke en sia bilanco de 31-12-82, BKE prezentas nek ŝuldojn, nek deficiton.

Ĉu miraklo?

Ne, tute ne. Simple okazis, ke anstataŭ "pruntpreni monon", la estraro decidis "peti ĝin donace" ... kaj ricevis!

Kiuj organizaĵoj donacis?

Bone, tio estas banka sekreto ...

Casc

KIO ESTAS ESPERANTO?

La 15-a de decembro estas grava dato por la mondesperantistaro, ĉar la 15-an de decembro de la 1859-a jaro naskiĝis la aŭtoro de la mondlingvo Esperanto.

Neniam ni forgesu nian majstron, Zamenhof, kontraŭe ni honoru lin pere de nia laboro favore al lia granda idealo.

Post preskaŭ cent jaroj la esperanta movado kreskis kaj la internacia lingvo disvastiĝis multe, sed ne sufiĉe. Ĝi estas internacia, neŭtrala, idealisma lingvo. Ĝin, ĝis nun disvastigas laboremaj pacamantaj esperantistoj, sed ĝi bezonas apogon de pluraj landaj aŭtoritatoj por atingi la celon de Zamenhof.

Antaŭ kelkaj tagoj vizitis nin prof-ro Dirceu Fernandes Lopes, ĵurnalisto de fama gazeto el Santos, "A Tribuna", kaj intervjuis la prezidanton de Centro Esperantista de Santos, prof-ron Almada kaj prof-ron Lauro Jorge de Oliveira, fondinto de la sama organizajo.

Aperis tutpaĝa informo pri Esperanto kaj esperanta movado en "A Tribuna" la 28-an de novembro de 1982 - a jaro, titolita: "Abaixo a Torre de Babel", ilustrita.

Prof-ro Dirceu F. Lopes jam delonge planis fari artikolon pri la internacia lingvo, pri kiu li jam aŭdis multe, li nur atendis iun gravan daton por realigi la planon, kiu aperis nun, kiam Esperanto iĝas centjara.

Liaj ĉefaj demandoj estis:

D) "Kio estas Esperanto kaj kion ĝi signifas al esperantistoj?"

R) "Ĝi estas neŭtrala interligilo tutmonda por plibona interkompreniĝado".

D) "Kial Esperanto ne estas plibone diskonigita?"

R) "Ĝi ne apartenas al iu nacio, sekve ne havas financan subtenon, kiel la aliaj naciaj lingvoj. La idealistoj, kiuj subtenas ĝin, ne nur laboras, sed pagas por labori por ĝia diskonigo".

D) "Kial ĝi, kiel centjara ne venkis ankoraŭ?"

R) "Ĝi ne estis destinata batali kaj venki iun, sed helpi al ĉiuj nacioj".

D) "Kial oni ne klopodas enkonduki ĝin en universitatojn kaj lernejojn?"

R) "Niaj gravaj organizaĵoj jam pritraktas tion".

Prof-ro Dirceu F. Lopes konstatis, ke vere senpage ne eblas labori kaj fari multon. Li promesis varbi ĝelernantojn, diskonigi Esperanton pere de la gazeto kaj ĝentile apogi nin.

Ni ĝoje observis, ke prof-ro Lopes eĉ ne rimarkis, ke li eklaboris senpage por la esperanto-movado. Forlasinte nin, li diris, ke ni estas entuziasmaj esperantistoj.

Li alvenis, kiel kurioza ĵurnalisto kaj foriris, kiel entuziasma neesperantisto.

Jen, altestimata prof-ro Lopes; tio estas Esperanto!

Maria Almada



LETEROJ RICEVITAJ

●●● "Comunico aos caros samideanos que a Prefeitura de Uberlândia não distribui revistas da cidade, e que elas me foram gentilmente cedidas para enviar para meus amigos brasileiros, americanos, alemães e japoneses, com cujos países a Prefeitura mantém negociações. Favor retificar a notícia publicada no Boletim Informativo nº 73, página 3. Grata". (Shyrlene Soares Campos, Uberlândia-MG).

●●● "O Delegado da Associação Universal de Esperanto em Porto Alegre, Dr. M. Belmonte de Abreu, ao cumprimentar em Esperanto o Vice-Presidente do Conselho de Ministros da Hungria, Dr. Lajos Faluveg, ao ensejo da visita do Vice-Presidente do Brasil, Dr. Aureliano Chaves, recebeu carta do mesmo, informando que a visita realizou-se numa atmosfera política muito agradável e ajudou a aproximação mútua Brasil x Hungria, para melhor conhecimento dos dois países. Ao mesmo tempo, com os cumprimentos da Embaixada Húngara no Brasil, recebeu publicações e prospectos da Associação Esperantista Húngara, entre esses, a tradicional revista "Hungara Vivo" e "Mondo kaj Lingvo", que vitalizam o movimento esperantista naquele país, onde se realizará o 68º Congresso Mundial de Esperanto em 1983". (Serviço de Informação da ESPA, Porto Alegre-RS).

●●● "Brazilo estas la plej bela kaj aminda lando inter centoj da tiuj kiujn mi konas. Bedaŭrinde, nur en aprilo mi povos reveni tien, por revidi la estimatajn amikojn ĉie, speciale en la redakcio de tiu Bulteno ..." (Berenice K. Eliot, Tel-Aviv, Israelo).

TER UM MILHÃO DE AMIGOS EM TODO O MUNDO...

Digna dos melhores encômios a feliz iniciativa da Liga Brasileira de Esperanto, ao reeditar e distribuir magnífico prospecto em língua portuguesa, ilustrado, informando sobre o que é o Esperanto, quais as vantagens em aprendê-lo e onde fazê-lo, para o que relaciona cerca de oitenta nomes e endereços de entidades esperantistas de todo o Brasil, inclusive o deste Conselho, que agradece.

Parabéns, Cel. Fernando José Galvão Marinho, digníssimo presidente da BEL.



BRAZILAJ NOVAĴOJ

FEDERACIA DISTRIKTO

● Donas fruktojn la kampanjo de BKE ĉe la Ambasadoj por havigi E-librojn por la Biblioteko de la Ĉambro de Deputitoj. Bulgario la unua faris donacon okaze de nia III Kongreso, kaj nun jam sin anoncis Finnlando kaj Ĉekoslovakio.

● Ankaŭ okazis io tre interesa: pere de la Brazilia Ministerio por Eksterlandaj Rilatoj oni petis el Kanado esperantajn prospektojn pri nia lando.

● LABORGRUPO "ANTAŬEN" (C. Postal 07-1055 - 70000 Brasília-DF), kiu kun BKE organizis la 39an Kongreson preparas novajn eldonojn por la jaro 1983.

AMAZONAS

● En la ĉefurbo Manaus fondiĝis AMAZONAS E-ASOCIO (C. Postal 1823 - 69000 Manaus-AM), kiu jam organizis du kursojn: unu ĉe la Spiritisma Federacio kaj aliaj en la Universitato.

BAHIA

● ASSOCIAÇÃO BAHIANA DE ESPERANTO (C. Postal 945 - 40000 Salvador-BA) komunikas: a) la 4an de decembro okazis omaĝo al E-instruantoj Alvares Carvalhal kaj Wilson Carvalho Nascimento; b) forpasis s-ano ONIAS ALMEIDA, granda batalanto en la ŝtato, kiu pli ol unu fojon estis prezidanto de ABE; c) en la urbo Candeias fondiĝis E-Kurso, gvidata de Prof. Marcelo Rocha; d) okazis en Salvador lanĉo de la libro "Poesia dos Signos" de s-ano Jorge das Neves.

● D-ro Isao Noguti, klera prezidanto de la supra Asocio, profitante sian vojaĝon en la ŝtatojn Rio k São Paulo, efektivigis diversajn kontaktojn kun la lokaj esperantistoj. Li vizitis kolonelon Fernando José Galvão Marinho, prezidanton de BEL, s-anino Elvira Fontes, prezidantinon de São Paulo E-Asocio kaj la prezidanton de BKE, s-ro Carlos A. Cunha, en kies hejmo ambaŭ interŝanĝis ideojn pri komunaj problemoj de la movado kaj ĉefe pri elekto de plej taŭga maniero kontribui al fortikiĝo de la bonaj rilatoj nun regantaj la naciajn E-organizaĵojn.

● La unua estraro de Esperanto Studgrupo "Zamenhof" enposteniĝis la 19an de decembro, kun mandato ĝis 1985, nome: Ivette Menezes Queiroz - direktorino; Zilda Maria Dias Cruz - vicdirektorino; José Saraiva Matos - sekretario; Nelson da Costa Barreto - kasisto; Maria Selma Dias Cruz - bibliotekistino; D-ro Benito de Al-

cântara Figueiredo, Edgar Nunes k Raimundo de Oliveira Queiroz - membroj de la kontrolo konsilantaro. Pro la efika agado de la Studgrupo eĉ pli frue ol la oficiala estrara enposteniĝo, ni sincere kredas je la plensukceso de la nova organizaĵo.

● Kiel postmorta omaĝo al la karmemora Etienne Ferreira Rocha, oni lin nomumis patrono de Bahia Spiritisma Esperantista Junularo, el Salvador, kies estraron konsistigas jenaj gejunuloj: Aldacy de Souza Xavier, Antonio Serravallo Magalhães, Joselita Almeida Conceição, Juçara Maria de Souza Dantas, Nadja Maria R. de Albergaria k Nilzete Nunes da Silva. Gratulon, feliĉon k "pilkon antaŭen!"

CEARA

● S-ano Prof. Paulo Amorim Cardoso (C. Postal 1221 - 60000 Fortaleza-CE) anoncas la 5an eldonon de sia libro "Esperanto Lingua Viva", kiu kostas Cr\$ 1.000,00.

GOIÁS

● En la urbo Iporá, de la 26a ĝis la 30a de januaro 1983, okazos la V-a Brazilia Esperantista Junulara Kongreso, organizota de BEJO. Ĉu vi jam aliĝis? La kotizojn (BEJoano - Cr\$... 1.500,00, ne-BEJoano - Cr\$ 2.000,00) oni sendu al la kasistino Cleuza de Souza Rocha - Caixa Postal 69, CEP 76.540 - Iporá.

MINAS GERAIS

● La GUSTA PRONONCO - Se vi volas aŭdi tiun kasedon, sendu Cr\$ 1.000,00 al: Sociedade Mineira de Esperanto - Rua Rio de Janeiro, 462 s/1202 - 30000 B. Horizonte-MG).

RIO DE JANEIRO

● ARCA BANCO DE DADOS (Rua dos Oitis, 58 ap. 301 - 22451 - R.Janeiro-RJ) estas Banko de Informoj, kiu havas grandan intereson ricevi ĉion pri Esperanto por informi la konsultantojn.

RIO GRANDE DO SUL

● En la urbo Cai estas futbalteamo kun la nomo "Esperanto", kiu partoprenas turniron. Kaj ĝi ne estas la lasta!

SANTA CATARINA

● S-ano Prof. EUVALDO PAULI, el Florianópolis, lanĉos baldaŭ sian verkon "Rekta Pensado", la unuan el serio de ses pri filozofio; la du sekvontaj estas "Pri dubo kaj Certeco" kaj "La Unuaj Filozofioj". La tuta plano estas grandioza: Kreo de Biblioteko de Filozofio "Fonto"; por tio li jam faris financan kontrakton kun s-ano Gersy Bays, el Chapecó.

SÃO PAULO

● Eldonejo "Amikoj de Esperanto" informas, ke por ĝin subteni jam enskribiĝis 82 socianoj; tial ĝia saldo en ŝparkonto estas Cr\$... 535.468,00.

● ESPERANTA GRUPO "ADOLFO BEZERRA DE MENEZES" (R. Dona Vicentina Alegratti, 265 - 03610 São Paulo-SP) okazigis diplomigon de siaj unuaj gelnantojn, la 20an de novembro, en la salono de Centro Espirita

"Adolfo Bezerra de Menezes" (R. Omachá, 182 03610 - São Paulo-SP).

● Je la 15-a de Decembro, Tago de la Internacia Lingvo Esperanto (oficialigita en Stato San-Paŭlo per la Leĝo nº 505, de 18-11-1974), efektiviĝis soleno organizita de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo ĉe la sidejo de Brazila Unuiĝo de Verkistoj, dum kiu estis liveritaj al kursfinintoj diplomoj de elementa kaj supera kursoj de Esperanto okazintaj ĉe la Asocio mem, Fraternidade Espírita Ramatis kaj Seara Bendita. Post la diplomoj estis ankaŭ liveritaj la premioj al la venkintoj de la Dua Internacia Konkurso pri Troboj (Kvarversoj), organizita de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo omaĝe al la Jaro Internacia de la Maljunuloj. La Konkurso prezentis du branĉojn: unu en Esperanto, pri la temo "aĝo", kaj la alian en la portugala lingvo, pri la temo "vivência" (vivosperto), kaj ĝin partoprenis trobistoj el 4 landoj: Brazilo, Usono, Jugoslavio kaj Svedujo, 10 brazilaj ŝtatoj kaj 35 urboj. En Esperanto gajnis la tri unuajn lokojn: Jorge das Neves, el Rio-de-Janeiro (unuano kaj duano), Euclides Carneiro da Silva, el Mogi das Cruzes SP (triano). Ricevis honorajn menciojn: Euclides Carneiro da Silva, Newton J. Monteiro (2), el San-Paŭlo, kaj Vesna Skaljer-Race (2), el Jugoslavio. Ricevis specialajn menciojn: Euclides Carneiro da Silva (2), Jorge das Neves, Leif Gunnar Nordenstorm (3), el Svedujo, Newton J. Monteiro (2), Symilde Schenk Ledon, el San-Paŭlo, kaj Vesna Skaljer-Race (2). Jen la trobo de Jorge das Neves gajninta la unuan premion:

Sur la sablo apudmara

mian aĝon lasis mi!

Ĝin forviŝis akvo klara

de la rev' kaj fantazi! . . .

● Por anstataŭi s-ron Grattapaglia en la ofico de Ĉefdelegito de UEA, ni konstatas ke la prefero de la samideanaro dividiĝas numtempe inter D-ro Walter Francini kaj Prof. Ivon Barbosa.

RENOVIGO DE OFICOJ EN U.E.A.

Laŭ la Statuto de Universala Esperanto-Asocio, ĉiuj oficoj, kun escepto de tiuj de dungitoj, daŭras maksimume tri jarojn.

Dum 1983 oni elektos novajn komitaton kaj estraron kaj la aliĝintaj Landaj Asocioj respondecos pri la nomigo de la delegitoj interkonsente kun la ĉefdelegito.

La ĉefdelegito, laŭ la Statuto, reprezentas la asocion en iu lando kaj estas nomita de la estraro de UEA interkonsente kun la respektiva Landa Asocio.

Laŭ tiu proceduro, la subskribinto estis nomita de UEA en 1976, post rekomendo de asembleo de brazilaj delegitoj okazinta dum la

seminario de KKE en Brazilio. Tiu nomigo estis konfirmita dum la elektojaroj 1977 kaj 1980.

Dum la lastaj ses jaroj la brazila Esperanto-movado mirinde ekfloris danke al kapilara agado de multaj aktivuloj tra la tuta lando. Tiu agado kulminis en 1981 per efektiviĝo de la 66-a Universala Kongreso de Esperanto kaj, en la sama jaro, Brazilo atingis la rekordan ciferon de 639 individuaj membroj de UEA kun 153 delegitoj en 60 urboj!

Mi forlasos la oficon de ĉefdelegito en 1983 kaj estos tasko de aliĝintaj Landaj Asocioj proponi nomon de taŭga kandidato al UEA.

Esence, ĉefdelegito devas esti je dispono de la membraro por ĉio kio koncernas nian internacian movadon. Li devas varbi por UEA kaj klopodi vastigi la delegitan reton. Konkrete dirite, tio signifas ampleksan korespondadon kun UEA kaj kun la membroj, tasko kiu neniel povas esti neglektita por ne kompromiti la prestiĝon kaj progreson de nia asocio en Brazilo.

La ofico de ĉefdelegito estas kompreneble sensalajra, kiel cetera ĉiuj oficoj en nia idealisma movado.

Sendube inter la brazilaj esperantistoj troviĝas homo, kiu estas preta plenumi tiun taskon por la venontaj tri jaroj.

Dum mia ofico-daŭro mi havis la plezuron eble konatigi kun multaj sinceraj gesamideanoj en Brazilo kaj vere sperti, ke esperantisto neniam estas frendulo eksterlande.

Al tiuj kelkaj ŝovinistoj, kiuj sisteme protestis ĉar la ĉefdelegito ne estis denaska brazilano, mi sugestas relegi la principojn de esperantismo kaj poste sin proponi por pozitive labori je la servo de la movado.

Giuseppe Grattapaglia

KOTIZOJ DE U.E.A. POR 1983

La aliĝoj al UEA por 1983 devas esti senditaj al Brazila Esperanto-Ligo aŭ al Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

La ĉefdelegito Giuseppe Grattapaglia, kiu restos en sia ofico nur ĝis la Kongreso en Budapeŝto, petas la membrojn ne sendi al li kotizojn, kiujn li ne povos transpagi al UEA.